*Esperantologio / Esperanto Studies* **2** (2001), 3

# Salutvorto de la redaktoro

Christer KISELMAN

Kara leganto

Estas ĝojo prezenti al vi la duan kajeron de *Esperantologio*! Ĝi enhavas tri originalajn studojn kaj kvar recenzojn. El la studoj po unu estas en esperanto, la angla kaj la franca; el la recenzoj du estas en esperanto, unu en la angla kaj unu en la germana.

Pri la aperiga politiko de la revuo bonvolu legi en la *Notico de la redaktoro* en kajero 1.

⋆

Heidi Goes faris detalan studon pri la esperantistoj en Tanzanio kaj Togolando en sia licencia disertaĵo prezentita en 1999 al la Universitato de Gento – ĝi ampleksas 156 paĝojn! Ĉi tie ŝi prezentas la plej interesajn trovaĵojn el tiu disertaĵo.

David Pardue profunde studis religion kaj la strebojn al lingva unueco en Brazilo kaj sciigas nin pri tio en zorge dokumentita artikolo.

Walter Żelazny, sociologo kiu laboras kaj en Francio kaj en Pollando, prezentas al ni siajn pensojn pri la sociaj kaj religiaj ideoj asociitaj al la fenomeno de la tiel nomataj artefaritaj lingvoj, metante ilin en vastan kultursciencan kaj sociologian kadron.

⋆

La recenzoj metas lumon sur kvar gravaj verkoj, kiuj aperis antaŭ nelonge.

Christopher Gledhill publikigis gramatikon de esperanto, kies specifaĵo estas ke ĝi baziĝas sur studo de korpuso. Liu Haitao recenzas la verkon en naŭpaĝa eseo.

Erich-Dieter Krause publikigis grandiozan vortaron en 1999. Ebbe Vilborg zorge pritraktas ĝiajn (grandajn) meritojn kaj (malgrandajn) mankojn en sia recenzo.

Anett Heil doktoriĝis en la Universitato de Rostock en 1998. Ŝia disertaĵo estas kompara studo pri gramatika redukto en francbazitaj kreolaj lingvoj kaj en planlingvoj. Liu Haitao recenzas ŝian verkon.

Finfine: Sabine Fiedler, jam konata de la legantoj de *Esperantologio* pro sia studo en la unua kajero, prezentis sian habilitigan disertaĵon al la Universitato de Lepsiko. Bazita sur ĝi ŝi publikigis libron pri frazeologio en planlingvoj. Ni aperigas recenzon verkitan de Till Dahlenburg.

⋆

Mi esperas ke vi ĝuos la legadon de tiuj ĉi artikoloj same multe kiel mi jam faris!

⋆

Mi sincere dankas al ĉiuj juĝlegantoj, kiuj zorge kaj malegoisme donis al la aŭtoroj el siaj spertoj, kaj tiel multe kontribuis al la kvalito de la kajero.